BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

# Sonorilo



59a jaro n° 1
januaro - februaro 1967

# Sonorilo

dumonata bulteno de B.E.F.


**redakcio :** Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge — tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

**kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :**
Dr. Pol Denoël — Durwael Ivo — Iserentant Roger

**administrado :** Terryn J. Raapstraat 72 Gent


Belga Esperanto-federacio

asocio sen profita celo

sidejo & prezidantejo
Debruynlaan 44, Wilrijk — tel. (03) 377758

**honora prezidanto**
Kempeneers Paul

**honora vicprezidanto**
Sielens Henri

**ĝenerala prezidanto**
Jaumotte Maurice

**prezidantoj**
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

**unua vicprezidanto**
Roose Fernand

**vicprezidanto fakestro pri teknikaj rimedoj**
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

**ĝenerala sekretario**
De Roover R., Luchtvaartstraat 28 Borgerhout tel. (03) 3942 94

**sekretario por la nederlandlingva regiono**
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr 51, St-Kruis tel. (050) 34935

**sekretario por la franclingva regiono**
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

**kasistino** Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent

**poŝtkonto de B.E.F. : 1634 34 Raapstraat 72, Gent**

**ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio**
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
p.k. 9051 25

# 49-a Kongreso de B.E.F.

## 6-a Kongreso de B. E. J. A.

PENTEKOSTO — KARLOREĜO

13/15.5.1967 — 60-a datreveno de la grupfondo

ADRESO POR KORESPONDADO
K. G. E. 73, rue de Montigny, Charleroi

**Honora Komitato :**

| | |
|---|---|
| S-ro CORNEZ | Provincestro |
| S-ro ABRASSART | Distrikta Komisaro |
| S-ro HUBAUX | Deputito — Urbestro de Karloreĝo |

**Loka Kongresa Komitato :**

| | |
|---|---|
| F-ino ORSOLINI Andrée | Prezidantino |
| S-ro DEVILLEZ Marcel | Vic-prezidanto (Eksteraj rilatoj) |
| S-ro DESTABELLE Roger | Sekretario |
| S-ro PAULUS Raymond | Kasisto — Kontisto / Traduka servo |
| S-ino GUILBERT Lucy | Loĝiga servo |

## PROGRAMO

**Sabato 13-a de Majo :**

14 h. Malfermo de la Kongresejo (Universitato de la Laboro).
Malfermo de la Poŝtoficejo kaj Ekspozicio de Esp.poŝtmarkoj (en la Honor-Halo de la Universitato).
15 h. Administranta kunsido de B.E.F.
16 h. Vizito de la Nacia Instituto de la Vitraĵo (tre modernaj konstruaĵo kaj Muzeo).
19 h. Distra vespero en la granda Aŭditorio de la Universitato (filmoj, ĥoroj, teatraĵo, magio, diapozitivoj).

**Dimanĉo 14-a :**

9 h. Sankta Meso en Esperanto en la Baziliko Sta Kristoforo.
10 h. Ĝenerala kunsido de B.E.F. (en la Universitato).
11 h. 30 Akcepto fare de la Urbestro (en la Urbdomo).
Vizito de la Urba Muzeo de Pentraĵoj, gvidata de la Muzeestro.
Komuna fotografado.
13 h. 30 Laŭvola komuna tagmanĝo en Loverval (Restoracio de la « Granda Lago » ĉe Centro Leburton).
15 h. Kunsido de B.E.J.A.

# Belga Esperanto-federacio

## 49-a kongreso de B.E.F. — Karloreĝo
## 6-a kongreso de B.E.J.A. — pentekosto

## 13a 14a & 15a de majo 1967

ADRESO POR KORESPONDADO
K. G. E. 73, rue de Montigny, Charleroi

### ALIĜILO

Mi aliĝas al la Kongreso kaj laŭ la suba specifo sendas la pagon al la Kasisto. (P.K. n° 67.32.84 de Karloreĝa Grupo Esperantista — Charleroi)

**FAMILIA NOMO :** S-ro — S-ino — F-ino ..................................................

**ANTAŬNOMO :** ..................................................

**STRATO KAJ NUMERO :** ..................................................

**URBO KAJ EVENTUALE LANDO :** ..................................................

| | NOMBRO | SUMO |
|---|---|---|
| **KOTIZO :** | | |
| Plenkreskuloj : 100 f. | .......... | .......... |
| Gejunuloj malpli ol 25.jaraj : 75 f. | .......... | .......... |
| Gejunuloj malpli ol 16.jaraj : 50 f. | .......... | .......... |
| **LOĜADO :** | | |
| Provizoraj prezoj kiuj inkluzivas la matenmanĝon, servon kaj takson por unu persono | | |
| 1-a kategorio : unupersona ĉambro : 265 f. | .......... | .......... |
| dupersona ĉambro : 220 f. | .......... | .......... |
| 2-a kategorio : unupersona ĉambro : 195 f. | .......... | .......... |
| dupersona ĉambro : 150 f. | .......... | .......... |
| tripersona ĉambro : 145 f. | .......... | .......... |
| **DIMANĈA BANKEDO :** 200 f. | .......... | .......... |
| **LUNDA EKSKURSO :** 200 f. (inkluzivas tagmanĝon) | .......... | .......... |
| Donaco por la propagando (federacia kaso) | | |
| Ni alvenos vagonare/aŭtomobile | .......... | .......... |
| Entute : | | .......... |

**DATO** .................. **SUBSKRIBO** ..................................................

15 h. 30 Promenado tra la arbaro ĝis la ultramodernaj konstruaĵoj de la estonta Kultura Centro Leburton.
19 h. 30 Bankedo en Charleroi.
Balo kaj lotumado.

**Lundo 15-a :**

9 h. 30 Foriro per aŭtoĉaro por Gerpinnes, kie okazos la jara famega « Marche Ste Rolende » (Marŝ-procesio Sta Rolanda).
Dum unu horo vi povos admiri la buntajn milit-kostumojn de la Napoleona tempo. En la proksima « Sonorilo », vi legos priskribon de tiu folklora evento.
12 h. Tagmanĝo en la belega Kastelo de Ham-sur-Heure.
14 h. Vizito de la feŭda Kastelo de Thy-le-Château.
Realveno en Karloreĝo kaj adiaŭoj.



**HONORA KOLONO**

**POR LA KONGRESO**

**EN CHARLEROI**

1 — S-ro M. Jaumotte - De Bruynlaan 44 - Wilrijk
2 — S-ino M. Jaumotte - sama adreso
3 — F-ino P. De Cock - Val. de Saedeleerstraat 19 - Aalst
4 — S-ro M. Vanderlinden — Dorpsstraat 44 - Astene
5 — S-ro H. Boffejon - Zegersdreef 95 - Brasschaat
6 — S-ino A. Boffejon - sama adreso
7 — F-ino H. Brack - Letterkundestraat 4 - Wilrijk
8 — S-ino J. De Hondt - Zamenhofstraat 7/2 - Antwerpen
9 — S-ro I. Durwael - Antwerpen
10 — F-ino A. Enzlin - Fred. de Mérodestraat 19 - Berchem
11 — F-ino Bl. Geers - Grote Beerstraat 7 - Antwerpen
12 — S-ino R. Lecat - Lange Lozannastraat 103/31 - Antwerpen
13 — S-ro J. Lernout - Heilig Kruisstraat 11 - Mortsel
14 — S-ro E. Lernout - sama adreso
15 — S-ino L. Merckx - Lange Herentalsestraat 117 - Antwerpen
16 — S-ino M. Th. Meulemans - Lotusstraat 3 - Wilrijk
17 — S-ro E. Paesmans - Lange Koepoortstraat 64 - Antwerpen
18 — F-ino Cl. Peeters - Onderwijsstraat 68 - Antwerpen
19 — S-ro Fr. Schellekens - Frans Hensstraat 44 - Antwerpen
20 — S-ro R. Van Humbeeck - Dambruggestraat 296 - Antwerpen
21 — S-ro H. Vermuyten (+) - Waterhoenstraat 9 - Antwerpen L.O.
22 — S-ino Vermuyten - sama adreso
23 — S-ro J. Verstraeten - St.-Bernardsesteenweg 1078 - Hoboken






RABATO POR ESPERANTISTOJ

24 — S-ro F. Volders - Van Maerlantstraat 37 - Antwerpen
25 — S-ro Fr. Couwenberg - Koninginnelaan 41 - Blankenberge
26 — S-ino A. Couwenberg - sama adreso
27 — S-ro A. Marmenout - Koninginnelaan 98 - Blankenberge
28 — S-ro R. Iserentant - Kerklaan 61 - Brugge
29 — S-ro Ch. Poupeye - Elf Julistraat 11 - Brugge
30 — S-ino G. Poupeye - sama adreso
31 — F-ino Yv. Poupeye - sama adreso
32 — S-ro G. C. Fighiera - 13 rue de la Reinette - Bruxelles 1
33 — S-ino A.Fighiera - sama adreso
34 — S-ro R. Jacobs - 94 rue Général Eenens - Bruxelles 3
35 — S-ino R. Jacobs - sama adreso
36 — F-ino J. Jacobs - sama adreso
37 — F-ino Opsomer S. - 24 Av. Marnix (9e étage) Bruxelles 5
38 — S-ro R. Harry, ambasadoro, 4 boulevard Brand Whitlock - Brux. 4
39 — F-ino A. Orsolini - 6 rue P. Pastur - Charleroi
40 — F-ino J. Terrijn - Raapstraat 72 - Gent
41 — S-ro G. Debrouwere - Magdalenastraat 29 - Kortrijk
42 — S-ino Yv. Debrouwere - sama adreso
43 — S-ro P. Denoël - 20 rue Victor Raskin - Liège
44 — S-ino A. Denoël - sama adreso
45 — S-ro S. Denoël - sama adreso
46 — F-ino M. Th. Henquinez - St.-Maartensdal 1171/5 - Leuven
47 — S-ino A. Meurrens - Naamsestraat 78 - Leuven
48 — F-ino J. Chaineux - 40 rue des Plantes - Verviers
49 — S-ino M. Mention - sama adreso
50 — S-ro G. Vanbreuse - Chemin Ma Campagne - Verviers
51 — S-ino Vanbreuse - sama adreso
52 — F-ino R. Vanbreuse - sama adreso
53 — S-ro E. De Vleeschauwer - Gebroeders Tassestr. 69 - Wijgmaal-Herent
54 — S-ino Durwael-Claes - Jan van Ophemstraat 4 - Aarschot
55 — S-ro Toint Jacques - 23 Grandfosse - Esneux
56 — S-ro de Roover - Luchtvaartstraat 28 - Borgerhout
57 — S-ino de Roover - sama adreso
58 — S-ro R. Destabelle - 2 Avenue Brunard - Fleurus
59 — S-ino J. Destabelle - sama adreso
60 — S-ro Guyot Martin - rue Chefneux - Barchon (Liège)
61 — S-ro Lemme Marcel - 28 rue Vivegnis - Liège
62 — S-ro Pirard Jean - 30 Rue des Muguets - Ougrée
63 — F-ino Godfried Marie - 19 Rue Lambert Grisard - Liège
64 — S-ro Barbier F. - 25 Rue des Rives - Montignies-s/Sambre
65 — S-ino Guilbert Lucy - 11 rue Boulvin - Roux
66 — S-ro Guilbert Jean-Pierre - sama adreso

**Germana Esperanto-Junularo, Belga Esperantista Junulara Asocio kaj Nederlanda Esperanta Junularo okazigos la 12-AN INTERNACIAN JUNULAR-KUNVENON**
de la 27-a de marto (posttagmeze) ĝis la 2-a de aprilo 1967 (posttagmeze) en la granda kaj agrabla junulargastejo de

**AACHEN**

« PROBLEMOJ DE DEMOKRATIO »

En mallongaj referaĵoj kaj pluraj diskut-rondoj ni traktos specialajn aspektojn, ekzemple jenajn :

1) « Evoluo de demokratiaj elementoj dum pasintaj jarcentoj »
2) « Jean Jacques Rousseau — heroldo de demokratio »
3) « Monarkio — respubliko — demokratio »
4) « Parlamentoj en diversaj ideologiaj sistemoj »
5) « Nederlanda parlamentismo kaj nova ekstremista partio »
6) « Eklezioj kaj demokratio »
7) « Demokratio en Afriko »

Ĉar la 12-a IJK estu ne nur stud-, sed ankaŭ ferio-semajno, vi havos sufiĉe da libera tempo por ekskursetoj kaj amuzado. Cetere ........................ dum du aŭ eĉ tri vesperoj vi bezonos reveni en la junulargastejon nur je la 23-a horo aŭ eĉ pli malfrue !

Pliaj informoj ĉe Maertens Dirk, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.


P. V. B. A.

**FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN**

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj – Speguloj – „securit" vitro
koloriĝitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

telefono 37.88.20


**HELSINGOR**

**La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23. - 30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe**

**L. Friis,**
**Ingemannsvej 9,**
**Abyhoj, Danlando.**

**N.B. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 15.-21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.**



15
1
67




**DIAMANTA JUBILEO DE « LA VERDA STELO » EL ANTVERPENO**

**KAJ JUBILEO DE ĜIA PREZIDANTO M. JAUMOTTE**

Sabaton, la 14-an de januaro je la 15-a horo limigita delegacio de « La Verda Stelo » kunvenis ĉe la enirejo de la Antverpena enterigejo « Schoonselhof » por sekvantare sin direkti al la tombo de S-ro Frans Schoofs kaj edzino, fondinto kaj 1-a Prezidanto de la grupo.

S-ro Maurice Jaumotte en emociplena paroladeto rememorigis la grandajn meritojn kaj laboremon de la Prezidinto kaj promesis — nome de la tuta grupo — daŭrigi la streĉojn por akiri la finfinan sukceson por Esperanto. Li poste solene deponis belan garbon de vivantaj floroj sur la tombon post kio ĉiu ĉeestanto havis la okazon saluti, siavice, la geedzan paron kiu tiom faris por nia kara lingvo kaj kies nomoj eterne estos kunligitaj kun la ideo de la internacia lingvo.

La malgranda kapelo en la Keizerstraat estis jam tute plena kiam ni eniris ĝin dimanĉmatene. Kompleksa impreso de io ne kutima kaj samtempe de miro akaparis nin kiam ni aŭdis la tutan Sanktan Meson en nia kara lingvo : pruvo de nia venka antaŭenmarŝado kaj de la vivanteco de Esp. La esperantlingvaj kantoj sonis bele. La muzika ludo de Jo Haazen atestis pri arta sento. La prediko estis bona komenco de la ĵusa esperantisto pastro Saen.

Tra la grizaj, malsekaj, aŭtunaj pli ol vintraj stratoj ni poste iris al la marista domo por la solena kunsido. Direktoro H. Sielens bonvenigis ĉiujn. Agrabla estis la salono kie ni aŭdis kiel unuan parolanton la prezidanton mem. Lia parolado estis ĉefe honorigo de liaj multaj fidelaj gekunlaborantoj kies liston vi povos legi ĉi-sube. Li ne forgesis — tute normale ! — sian edzinon. Ankaŭ la postaj paroladintoj same substrekis la grandan meriton de afabla kaj kiom simpatia s-ino Jaumotte-Locquet. Estis la tasko de S-ro H. De Roovere por honorigi la

prezidanton ; kaj li majstre faris tion. Poste paroladis D-ro P. Denoël en la nomo de nia federacio. Ankaŭ lia parolado estis originala, tute sen la en tiuj cirkonstancoj kutimaj banalaĵoj. Ni havis la honoron vidi en nia mezo la akson de la universala movado, fraŭlinon Vermaas, kiu alportis la gratulojn de UEA. Ŝi emfazis kiom alte la UEA-estraro, en mallonga tempo, ektaksis la laborkapablon de S-ro M. Jaumotte. Kaj tiam venis la multaj grupsalutoj de s-roj V. Eynde (EKI), Jacobs (Bruselo) kun floroj, Paesmans k.a. Tre emociigaj estis la minuto de silento kaj la honorigo de vidvino H. Vermuyten, kiu ĉeestis malgraŭ la ĵusa morto de la edzo. Ja tiu-ĉi kunveno ne estis ordinara distriĝo. Ni ne ankoraŭ aŭdis ĉiujn anoncitajn paroladetojn kiam ni devis iri al la urbdomo por la solena akcepto. Ni unue vizitis tiun plej belan renesancan konstruaĵon de nia lando. Kaj nun S-ro M. Jaumotte ludis la



DELEGITARO EN LA URBODOMO ALPAROLITA DE URBESTRO L. CRAEYBECKX

rolon de turistgvidanto ! Venis la urbestro mem. Ni ne rapide forgesos la komencon de lia alparolado : 50 jarojn esperantisto ; 40 jarojn prezidanto ; estas longa tempo ! Tamen estas io kio vi estas pli longtempe : mia amiko ! Tiuj vortoj venis el la koro ! Poste li klarigis lian sintenon rilate al la lingva problemo : flandrema kiel decas al Flandro ; kaj favora al Esp. kiun li ankoraŭ defendis antaŭ nelonge en la Sovet-Unio. Tute normale li diris kelkajn afablajn vortojn en Franca lingvo al la Valonoj. S-ro Jaumotte dankis kaj prezentis kelkajn personojn. Tiam la honorvino.

La festa bankedo okazis en la bela salonego « Magnus ». Servo kaj manĝaĵoj estis tre tre bonaj. Tie ni povis aŭdi la aliajn paroladetojn (kun la multaj donacoj, i.a. ankaŭ mondonacoj por la fondaĵo kiu portas la nomon de la fondinto, kaj unua malavara mondonacinto) de s-roj Hérion, Poupeye, Roose, f-ino Orsolini kaj multajn aliajn, same kiel la multajn telegramojn. Kaj ankaŭ, senhezite kaj plej zorge elparolitan, trafan paroladeton de la nepino de la jubileanto : filineto Viviane Jaumotte al « lia ava kaj prezidanta Moŝto » kaj pro kiu ŝi akiris varman aplaŭdan sukceson. Post la manĝado ni devis trinki la kafon en apuda ejo, por ke oni pretigu la salonon por la balo. Tie okazis la lotumado de la multaj premoj. Kaj ni rimarkis ke la multaj gvidantoj kaj gvidantetoj de la movado profitis la okazon por diskuti pri problemoj sendube de organizado, financado ktp.

Sub la premo de la cirkonstancoj — la malfruiĝa horo — oni rezignis al la distra programo kiun la junulara sekcio intencis prezenti (tute interkonsente kun la gejunuloj).

La balo finfine iĝis sukceso. Bona, moderna, 3-persona orkestro zorgis por la muziko plej diversa : « freŝdata » por la gejunuloj kaj « iamtempa » por la « eternaj gejunuloj » kiuj abundas en la ĉeestantaro.

S-ro Eug. Paesmans sin konigis — agrable surprize — kiel bonega paroladisto, anoncante ĉiufoje la diversajn numerojn aŭ okazontaĵojn.

Kelkaj rimarkindaj interrompoj de agrabla dancado permesis al S-ino G. Debacker humoriste honorigi la Prezidanton M. Jaumotte per kelkaj gravaj ordenoj en formo de rubandoj kaj pergameno kiujn la Prez. akceptis kun la plej serioza mieno.

Ges-roj Van Genechten prezentis ne nur muzike sed ankaŭ teatre, en ensorĉe bela kostumo, partojn el la fama « My fair Lady » kaj vekis grandan aplaŭdon kaj sukceson.

Dank' al S-ino G. Debacker, kiu ĉion antaŭe preparis, S-ro J. Verstraeten plezure laŭtlegis lastmomentajn alvenintajn telegramojn por S-ro Jaumotte, — telegramoj forsenditaj de Mao Tse Toeng, De Gaulle, Lindon Johnson, Piet kaj Margriet Van Vollenhoven, k.t.p.

S-ro I. Durwael prezentis pantomiman intermezon kies titolo « Fraŭlino Yvonne faras sian matenan tualeton » estas sufiĉe esprimplena por konigi la enhavon. S-ro Durwael bonege aktoris kaj plene meritis la abundan aplaŭdon je la fino.

Je iu momento S-ro Fr. Schellekens, ĉefdeligito de U.E.A. en Belgujo, altiris la tutsalonan atenton pro la datreveno de lia naskiĝo... Okazo por la ina sekso abunde disdoni kisojn je la plezuro — aŭ ne ? — de la « festporko ».

Dum la dancoj kaj por enkonduki ilin S-ro Serge Denoël montris siajn « temperamentplenajn » talentojn dum la diversaj komitatanoj de « La Verda Stelo » aldonis siajn « ŝtonetojn » en la tuto por agrabligi kaj sukcesigi la lastan eron en la tuttaga programo. Ĝi estis konkludata per lasta entuziasma « ĝenerala adiaŭa » danco iom antaŭ la noktmezo . . .

Tiu tago estis ĉiusence belega ; kaj por gesinjoroj Jaumotte, kaj por la « Verda Stelo » kaj por ĉiuj kiuj ĉeestis.

**Listo de la Gejubileantoj en 1967**

**ORA MEDALO**
pro 50-jara fidela membreco

1917 : S-ro Maurice Jaumotte

**ARĜENTA MEDALO kun du oraj steletoj** pro 45-jara fidela membreco

1922 : S-ro Maurice Boeren

**ARĜENTA MEDALO kun unu ora kaj unu arĝenta steleto** pro 40-jara fidela membreco

1926 : S-ino Blanche Vermuyten
1927 : S-ino Jeanne De Hondt
ambaŭ ricevis la plakedon de veteraneco.

**ARĜENTA MEDALO kun unu ora steleto** pro 35-jara fidela membreco

1932 : S-ro Willy Boffejon
F-ino Hélène Hofkens
F-ino Mathilde Hofkens

**BRONZA MEDALO kun unu ora steleto** pro 20-jara fidela membreco

1947 : S-ino Henny Jacques

**BRONZA MEDALO kun unu arĝenta steleto** pro 15-jara fidela membreco

1952 : S-ino Maria De Winter-Verschaeren
F-ino Françoise Jaspers
S-ino Marie-Louise Montmirail
F-ino Clara Peeters
S-ro Hubert Peeters
S-ino Maria Philips
S-ino Eugenia Thibau - Toussaint
F-ino Rita Thibau

**BRONZA MEDALO**
pro 10-jara fidela membreco

1957 : F-ino J. De Pauw
S-ino H. Seghers
S-ro Toni Montmirail

**La aliaj geposedantoj de medaloj pro fideleco**

1920 : S-ino Marguerite Jaumotte
S-ino Lucette Faes
1926 : S-ro August Faes
F-ino Maria Jacobs
1928 : S-ino Livina Merckx
1929 : S-ro Hector Boffejan
S-ro Roger Jaumotte
1931 : S-ro Henri Sielens
1933 : S-ro Henri De Hondt
1946 : S-ino Felicie Jaumotte
S-ino Rena Lecat
S-ro Charles Aalders
F-ino Blanche Geers
S-ro Jan Jacobs
S-ino Bertha Jacobs
S-ro Karel Ameryckx
S-ro Pierre Peelman
S-ro Richard Torremans
S-ro Remy Van Eynde
1950 : S-ro René Balleux
S-ino Nathalie Balleux
S-ino Lea Bernaerts
S-ro August Debacker
S-ino Germaine Debacker
F-ino Lisette De Winter
S-ino Alice Govaerts
F-ino Henriette Heyens
F-ino Golda Leibovitche
S-ro François Schellekens
S-ro Eugeen Seghers
S-ro Alfons Vercruyssen
S-ro Jules Verstraeten
1951 : F-ino Hortense Brack
S-ino Rosine De Soete
S-ino Mathilde Landerwijn
S-ro Jozef Montmirail
S-ino Louise Timmerman
S-ro Wim Verdyck
S-ro Jozef Verstraeten
S-ino Johanna Verstraeten
1953 : S-ro Hugo Jacques
S-ino Rachel Van Eynde
S-ro Karel Van Gompel
1954 : S-ro G. Vanderscheuren
S-ino Vanderscheuren
F-ino Marit Montmirail
F-ino Herlinde Montmirail
S-ino R. Torremans
S-ino Paula Debacker-Sette
1955 : F-ino Maria Blondeau
F-ino Anny Enzlin
S-ro Eugeen Paesmans
S-ino Johanna Peeters
F-ino Conny Schellekens
S-ro Carlos Tijtgat
S-ino Paula Tijtgat
F-ino Linda Verdyck
1956 : F-ino Elvire De Coene
S-ro Luc De Marré
S-ro Frans Govaerts
S-ro Frans Peeters
S-ino Maria Rousseeu
S-ro Albert Van Dessel
S-ino Philomena Van Dessel
S-ro Roger Van Humbeeck



# FONDAĴO M. Jaumotte - Loquet

**FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO**

| | |
|---|---|
| **La Verda Stelo** | |
| **(Okaze de la Jubileoj)** | **5000 F** |
| **Anonima Verdstelano** | **1000 F** |
| **Estraro UEA** | **1500 F** |
| **Liêga grupo** | **1000 F** |
| **Brusela grupo** | **1000 F** |
| **La supre menciitaj donacoj okazis dum la jubilea festo honore al S-ro M. Jaumotte en Antverpeno** | |
| **S-ino Mathieu-Plumhans** | **141 F** |
| **(kiu pagis ĉiujare, nun por 1966 kaj 67 la nombron de la vivjaroj en frankoj)** | |
| | **9641 F** |
| **Ges. Vermuyten - Lacroix** | **1000 F** |
| **S-ino Lecat R.** | **1000 F** |
| | **11641 F** |
| **Transpreno** | **105800 F** |
| | **117441 F** |


**Kun danko**
**La prizorganto : Maertens G.**

**La Ĝenerala Konferenco de UNESKO, kiu finiĝis la 30-an de novembro 1966 en Parizo decidis rekomendi al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO esplori la eblecojn dum la laborperiodo 1969-1970 per eksperta komisiono studi la bezonon kaj la eblecojn utiligi internacian lingvon apud la naciaj lingvoj por diversaj sferoj de la homa aktiveco. La demandon oficiale levis Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedlando.**

**ESPERANTO kiel oficiala lingvo en la internacia Ornitologia Asocio**

Nia ano S-ro W. De Smet sciigis al ni ke dank al la klopodoj de la Ornitologia Rondo Esperantista, nia lingvo nun estas unu de la oficialaj lingvoj en internaciaj Ornitologiaj kunvenoj apud la franca, Nederlanda, germana kaj angla.

La Ornitologia Rondo Esperantista nuntempe havas membrojn en 16 landoj.



# GRUPA VIVADO

**ANTVERPENO**

**ESPERANTO-GRUPO**
**« LA VERDA STELO »**

Kunsidoj : Ĉiuvendrede en Brasserie « Capitole », Gemeentestraat 15, Antwerpen je la 20, 15-a horo.
**Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.**

La 4-an de novembro S-ro R. Van Eynde prezentis belajn dokumentajn filmojn inter kiuj unu Esperante parolata : « La Kariba Barajo ». Al ties realigo kunlaboris : F-ino A. Geelen kaj S-ro R. Van Humbeeck (traduko + parolado) ; S-roj J. Montmirail (teĥniko) kaj J. Verstraeten (reĝio). Entute harmonia kunlaborado kiu donis plej bonan rezulton.

La 11-an ne okazis kunveno pro festotago kaj la 18-an S-ro R. Balleux paroladis pri la « Nigra Arbaro ». Li prezentis, krom la diapozitivojn, ankaŭ kolorfilmon pri tiu belega regiono faritan de sia bofilo kun multa gusto kaj veraj kinejaj efektoj.

La 25-an la estraro de la grupo eksciis ke tiu vespero estus la lasta en la kunvenejo « De Witte Leeuw » post restado tie de pli ol 40 jaroj ! Kun iom da emocio S-ro M. Jaumotte tion komunikis kaj samtempe iom alarmkriis pro la fakto ke nova kunsidejo ankoraŭ ne estas trovita. Tio devus okazi antaŭ la sekvonta vendredo. La temo de tiu vespero estis : Kultura Distra Programo kaj ĝin prizorgis : S-ro F. Jacobin per rimarkinda paroladeto pri la multaj diverslingvaj vortaroj kiujn li posedas ; F-ino A. Geelen kun kvizo kaj konkurso kiuj alportis amuzon kaj distron sed laborigis la ĉeestantojn ; S-ro Jo Haazen kiu aŭdigis kaj komentis la belegan Adaĝon de Thom. Albinoni.

La 2-an de decembro la miraklo realiĝis : nova ejo estis trovita. Estas freŝkolora, belaspekta, moderna salono kiu vekas familian sferon kaj kiu precipe allogis la gejunulojn ! Ĝi situas je la 1-a etaĝo de Brasserie « Capitole », Gemeentestraat 15, Antwerpen (tre apude de « Witte Leeuw » kiu nun ne plu ekzistas sub tiu nomo). La Prez. S-ro Jaumotte prezentis la novan estron al la ampleksa ĉeestantaro (40 personoj) kaj bonvenigis la verdstelanojn en la nova salono. S-ro R. Van Eynde havis la honoron inaŭguri la kunvenejon kun Esperanto-filmo « La Artaj Profesioj en Aŭstrujo ». Tradukis la tekston : F-ino Bl. Geers ; teĥniko : S-ro J. Montmirail ; reĝio kaj parolo : S-ro J. Verstraeten.

La 9-an S-ino Fr. De Roover paroladis pri Vizito al « El Paradiso » en Italujo kaj ilustris sian raportadon per multaj detaloj ĉu turismaj, ĉu familiaj kaj per dia-oj memverkitaj kaj en koloroj plej feinaj !

Merkredon, la 14-an, en la kadro de E.K.I. (Esperanto-Komitato Intergrupa) Zamenhofa Vespero estis organizita en la Aŭditorio de Gevaert-Agfa fabrikoj en Mortsel. Belega salono kun mirinda arĥitektura koncepto, plenakustika. S-ro R. Van Eynde (dank' al kies kontaktoj oni akiris la salonon ! !) malfermis la kunsidon kaj bonvenigis la ± 100 ĉeestantojn ; (gemembroj de la diversaj antverpenaj grupoj). La montrado de kelkaj Bulgaraj Esperanto-filmoj kaj bela kolorfilmo de la firmo Gevaert mem pri la fabrikado de la filmmaterialo estis la du partoj de la vespero kiun S-ro M. Jaumotte, Prez. de E.K.I., kunligis per sia festparolado. I.a. li laŭtlegis la unuan paroladon kiun D-ro Zamenhof elparolis en la unua Esperanto-Kongreso en Boulogne-sur-Mer. Pro la « Tago de la Libro » budo estis organizata en la halo de Ges-roj R. Balleux kaj S-ro J. Bonte. Monkolekto plifortigis la E.K.I.-kason.

Dimanĉon, la 18-an 33 infanoj, gefiloj de la membroj, kunvenis en « Capitole » por festi la jam tradician Kristnaskfeston. En la bela, nova kunvenejo, ornamita per kelkaj originalaj kaj modernaspektaj Kristnaskmotivoj (verko de S-ro F. Schellekens) la 33 invititoj altabliĝis por gustumi la dolĉajn kukojn kaj la ĉokoladan lakton ! Kelkaj amuzaj filmetoj prezentitaj de S-ro J. Montmirail kaj la (precipe por plenkreskuloj) ensorĉinda programo kiun la infanoj mem flegis per kantado, deklamado aŭ rakontado, ĉio sub la nekomparebla gvidado de S-ro M. Jaumotte, estis la antaŭplado al la vera festeno ! Kiam « Paĉjo Kristnasko » (S-ro R. Balleux) envenis, la plezuro de l'infanoj iĝis plej granda. Precipe kiam li disdonis la multajn donacojn kaj dolĉaĵojn ! Je la fino 33 feliĉaj verdstelidoj kun briletantaj okuloj reiris hejmen la brakojn plenajn. Dankon al S-inoj M. Jaumotte, N. Balleux kaj F-ino H. Brack por la organizado de tiu bone sukcesinta vespero !

---

**SAT-AMIKARO (Labor. Esperanto-Asocio por la franclingvaj regionoj) okazigos sian 22-an Kongreson de 25.-27. marto en Anderlecht (Bruselo). Aliĝilon kun detaloj petu al la sekretario de la Organiza Komitato : S-ro C. Druant, 42 Rue du Paruch, Bruselo-8, Belgio.**

**La 40-a Kongreso de S.A.T. okazos de 29. julio ĝis 5. aŭgusto en Malmö, Svedio. Petu aliĝilon kun informoj al la sekretaria adreso : S-ino Elsa Johannsson, Värnhemsgat an 2 A III, Malmö-O, Svedio.**

---

La 23-an pro ne-disponebleco de la salono en la nova sidejo kunveno ne okazis.

La 30-an, antaŭlasta tago de la jaro, diversaj gemembroj, laŭ amuza maniero, plenigis la programon.

La 6-an de januaro 1967 la Prez. Jaumotte bonvenigis ĉiujn tre kore kaj deziras la plej bonan por la nova jaro. S-ro J. Verstraeten faris la « Rerigardon al la jaro 1966 per eltondaĵoj el la gazetoj + komentario.

La 13-an oni dediĉis al la preparoj por la festoj de la grupa jubileo.

**FAMILIA VIVO :**

Kun granda plezuro ni eksciis pri la honorigo de S-ro R. Jaumotte, filo de la Ĝenerala Prez. de B.E.F. Li promociis kiel « Kavaliro en la Kronordeno » ! Al nia bona amiko Roger, al edzino kaj filinoj, al la gepatroj : niajn korajn gratulojn !

**PROMOCIO**

Per Reĝa dekreto de la 23-a de januaro 67 estas konfirmita la propono de la superaj ruĝkrucaj instancoj nomi S-ron Maurice Jaumotte, provinca prezidanto de la Belga Ruĝa Kruco.

Tiu-ĉi dekreto estas konfirmo de la fido de la Ruĝkrucanoj en la laborkapablo de nia ĝenerala prezidanto... kaj ni gratulas lin pro tiu plia honorigo kaj esperas ke li, ankoraŭ longtempe, povos plenumi tiun belan taskon.

---



**Ensendojn por la marta-aprila numero ni petas antaù la 20.3.1967**

**NEKROLOGO**

Kun bedaŭro ni devas anonci la morton de S-ro Willem Dollez kiu estis fidela membro jam de antaŭ la milito. Al la edzino kaj la familianoj ni sincere kondolencas.

**Sincerajn kondolencojn al vicprezidanto S-ro H. Sielens pro morto de edzino.**

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO 3
Tel. : 16.89.92 Entrepreno de
KONSTRÛAJOJ

ESPERANTISTA GRUPO VERVIERS

PASINTAJ KUNVENOJ :

10-a januaro : S-ro Jean-Marie Géron pri Judaismo.

24-a januaro : D-ro Denoël pri Organizo de la belga - esperanto - movado.

7-a februaro : S-ro Jos Hérion pri Historio de la Homaro (2-a parto) « De la naskiĝo de Eŭropa ĝis la Kruc-militoj ».

VENONTAJ KUNVENOJ :

7-a marto : S-ino A. Hérion pri « La multvaloraj ŝtonetoj ».

21-a marto : S-ro R. Demarcke pri Vieno kaj Bavarujo kun lumbildoj.

11-a aprilo : S-ro Prof. Vanbreuse pri Astronomio.

25-a aprilo : S-ro Prof. Bonaventure pri Historio de la muziko.

La libervola kurso, kiun gvidis ĉe la Reĝa Ateneo Prof. Jacob, lastan jaron, nun fariĝis oficiala, en la kadro de la komplementaj studoj, por la lernantoj de la 4-a klaso. Dume, Prof. Vanbreuse daŭras instrui en la 5-a klaso.

**« El Popola Ĉinio »**

Estas ankoraŭ tempo por aboni tiun belegan dumonatan revuon ĉe nia libroservo « S o n o r i l o » Kerklaan 61, Brugge. Prezo : 80 F. por tri jaroj (!)

**Reĝa Esperantista Brusela Grupo Brusela ĝenerala Jarkunsido de 30.1.67**

K O M I T A T O :

Prezidanto : JACOBS René

Vic-Prezidanto : FIGHIERA Gian Carlo

Kasistino : JACOBS Rose

Sekretario : DEBAENE François

Help-Sekretariino : OPSOMER Simone

EKI-Delegito : CASTEL Hector

Informantino : NELIS Nadia

**Radio Praha denove disaŭdigas en Esperanto. La disaŭdigoj okazas ĉiumerkrede sur mallongaj ondoj 31,56 mj = 9505 khc kaj 49,55 mj = 6055 khc je la horo 9,30 de MET dum germana programo.**

**KARAVANESTRO SERĈATA**

**kiu gvidos samideanaron al la EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO 1967 en INNSBRUCK.**

**Interesitoj skribu al : Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16 1150 Wien, Aŭstrio.**



**GRUPA VIVADO**

**« Paco kaj Justeco » Brugge**
Junulargrupo SINT-KRUIS.

Sabaton la 8an de januaro okazis la jara kaj tradicia grupa festo en la gastama hejmo de gesinj. Roose. De multaj horoj antaŭe F-ino De Koninck estis aranĝinta la tablon kaj la tostojn. Bonega manĝo, gajega atmosfero. Cirkonstanca parolado de la prezidanto. Revuo de proksimume 1 horo fare de A. Dumarey kaj. Gr. Maertens. Grupaj ludoj. Kaj... belega donaco al la prezidanto. Oni disiris ĉirkaŭ la 3-a horo matene ; kaj la gegastigantoj kun infanoj povis tiam ankoraŭ labori ĝis la 5-a horo ! !

Kaj la sabaton poste en la sama hejmo okazis la festo de la junulara grupo ! Ankaŭ tiu bonege sukcesis. Ili disiris je la 11-a horo tiel ke la hejmanoj devis labori nur ĝis la 2a matene ! Sed, kredu, kvankam lacaj, ili faris kun plezuro.

La 16-an de feb. ni havis en la grupo debaton pri « Kulturaj Centroj » sekve de demando de la ministerio tiurilate. Raporto estis poste sendita al tiu ministerio. Ni havis ankaŭ intertempe la ĝeneralan jarkunvenon kaj la Zamenhof-vesperon.

La junulargrupo tre regule kunvenas la sabaton por Volley-ludi kaj dimanĉmatene por lerni. Profunde ili nun studas detalojn de la gramatiko.

**INFORMO**

Dimanĉon la 23an de aprilo okazos la esperanto-tago de la internacia foiro de LILLE (Francujo).

**El la tagordo :** Turisma jaro. Oficiala akcepto. « markola » kongreso en CALAIS (13-15-an de majo).

ESPERANTO,
178 Chemin Castro, F 62, CALAIS.

**KORESPONDADRESOJ**

S-ro M. Nedlin, Leningrad M-233, Vitebski pr. 61/3-44, Ruslando deziras korespondi.

S-ro Noel C. Austin, 3 Queensdale Crescent, Knowle Park, Bristol 4 Britujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, uzitajn aŭ ne-uzitajn.

S-ro Ton Strelich, 45 jara, kartografisto, kun edzino kaj tri gefiloj, deziras korespondi : 2824 Sill Avenue, Balcenfield, California, USA.

S-ro Spandonia Stoev Dimitrov, str. Durvaw 10 RUSE, Bulgario, estas laboristo en kemika uzino kaj deziras korespondi.

S-ro Elizio Rosa Ramos, Caixa Postal 5888 Sao Paulo, Brasil, deziras korespondi pri muziko kaj interŝangas poŝtkartojn kun gefraŭloj.

S-ro Rada Karel, Kozinova 166, Vyskovice, Ostrava 4, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝangi poŝtmarkojn.

D-ro Kardos Miklos, Szeged, Bocskai n 6, volas korespondi pri lingvistiko kaj poŝtmarkoj (temoj) ; parolas la lingvojn rumanan, serban, germanan, kaj Esperantan.

S-ro Alexander Belĉev, 22- jara studento, str. 349=33, Sofia -24 deziras korespondi.

S-ino Boklak Maria, Krakovo, Curie Sklodowskiej 14/1, Pollando deziras korespondi.

F-ino M. Kollarova, Zilina Strazov 121 Ĉeĥo-Slovakujo, juna studentino. Pri ĉiuj temoj.

## manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54

# VIRINAJ BLUZOJ
# " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekcibutikoj

## PRECIPAJ CENTROJ :

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| | | Leysstraat 10 |
| Arlon | : | 12 Marché-aux-Légumes |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Anspachlaan 194 |
| | | Oude Kleerkoperstr. 31 |
| Gent | : | Brabantdam 21 |
| Herstal | : | 4 Rue Large Voie |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 13 |
| La Louvière | : | 16 rue Albert 1er |
| Luxembourg | : | 67 Place de la Gare |
| Mechelen | : | IJzeren Leen 32 |
| Oostende | : | Kapelstraat 23 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | 75 Rue Royale |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | 2 Pont St. Laurent |
| Wetteren | : | Jos Buyssestr. 39-a |

— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint-Kruis Brugge —